

7-8

1980

**MONATA REVUO
FONDITA
EN JARO 1903**

**OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA**



**ESPERO
KATOLIKA**

Honora Prezidanto:

Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B-3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:

Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I-47037 Rimini/Forlì, Italio

Vicprezidantoj:

Sac. Roger Degrelle, 11 cours Léopold, F-54042
Nancy Cedex, Francio;
Sac. Józef Gotter, Trzebnice 113, PL-59.312
Chocianowiec, Pollando

Sekretario:

Antonio De Salvo

Kasisto:

Sac. Felice Ruaro, I-37010 Costermano (Verona),
Italio

Estraro:

A. Beckers, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki,
J. Gotter, L. Kóbor, J. Kondor, J. Korytkowski,
F. Ruaro, J. Zielonka

Plenumkomitato:

Aŭstrio: W. Mudrak; *Belgio:* E. Paesmans; *Ĉeĥo-
slovakio:* J. Pastrnakova, M. Sváček; *Francio:* L.
Bourdon; *F.R. Germanio:* B. Eichkorn; *Hispanio:*
M. Casanoves; *Hungario:* E. Stancz; *Italio:* A. Cic-
canti, S. Giacchino, G. Pisoni; *Nederlando:* S. P.
Smits; *Pollando:* J. Korytkowska, J. Kos, B. Sobol;
Svislando: F. Bommer; *Usono:* A. Herschel

Centra Oficejo:

Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 7588388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:

Espero Katolika

Kotizo por 1979:

20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la Tribunalo de Romo

(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondecia Direktoro (Direttore Responsabile):

Antonio De Salvo
C.P. 4017, I - 00100 Roma Appio (Italio)
tel. (06) 780782 (vespere)

Presejo (Tipografia):

ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

Sur la kovrilo: procesio, en Romo, honore al la
Madono de l'Karmelo (v. p. 107). Foto Ansa.

ENHAVO

- 107 La Madono de Monto Karmelo
(A.D.S.)
- 108 Hiroŝimo (A. De Salvo)
- 108 Kun la nekredantoj veni en inter-
parolon
- 109 Maria Farsetti kaj la C.O. de IKUE
(A.D.S.)
- 111 Kunlaboro (W. Mazur)
- 111 Kiel aktivigi la junularon?
- 112 Ne por lerni la italan venis mi al
Romo (K. Laughery)
- 115 Katolika horizonto
- 118 Ni dankas
- 118 Kuncelebrado en Stokholmo
- 119 Papaj preĝintencoj por septembro
- 119 Temo por Ekumena Kongreso
- 120 Legantoj skribas (B. Sobol; el Bri-
tio; J. Książek; J. Cremer)
- 123 Ni gratulas
- 124 Maitri-Movado por interŝanĝo kun
la Landoj de la Tria Mondo
- 126 Elektu vi mem vian kategorion!
- 127 Kotizoj 1981
- 128 Landaj reprezentantoj de IKUE

La fotoj de ĉi tiu numero estis aĵable liveritaj de:
la Itala Registaro (Presidenza del Consiglio dei Mi-
nistri); K. Laughery (Usono/Vatikano); A. Ciccanti
(Italio).

Periodico culturale - gruppo III - pubbl. inf. 70% -
lire 600.

Kultura periodaĵo - monata - malpli ol 70% da
reklamo - 600 liroj.

LA MADONO DE MONTO KARMELO

La 16-an de julio la Eklezio honoras la Dipatrinon per la nomo « *Madono de Monto Karmelo* ».

En Italio, tra la jarcentoj, preskaŭ mil diversaj kult-lokoj (bazilikoj, sanktejoj, parokoj kaj kapeloj) viciĝis honore al la Madono de l'Karmelo, kaj ĝuste en Italio tiu Madono estas aparte honorata, ankaŭ per eksteraj aranĝoj (kermesoj, procesioj, folkloro).

Tiel, ekzemple, en Romo (*Festa de noantri* — Nia Festo), en Napolo (piroteknika brulego de la svelta sonorilturo de la Baziliko honore al la Madono « *del Carmine* »), en Fasano, ĉe la okcidenta bordo de la Garda Lago (kvinkilometra pilgrimado al Salò), sur Monto Tabor apud Bardonecchia/Torino, je 3.000-metra alteco, ktp.

Kutime oni opinias, ke la spirita signifo de la devoteco al la Madono de l'Karmelo limiĝas al la promesoj, kiujn — laŭ tradicio datumanta de la 14-a jarcento — la Virgulino kunligis kun religia objekto nomata skapulario (ŝirmado kontraŭ la Infero, kaj rapida liberigo el la Purgatorio, por tiuj kiuj, dumvive, inde surmetis ĝin).

Sed la festo de la Madono de l'Karmelo, en sia vera signifo, estas profunde spirita: fakte, surhavi la skapularion signifas aparteni al la familio de l'Karmelo, kaj alpreni ĝiajn sindevigojn.

La honorado de la Madono de l'Karmelo komenciĝis proksimume en la jaro 1207, kiam ermita grupo kuniĝis ĉirkaŭ preĝejo, kiun ili mem konstruis sur Monto Karmelo, en Palestino, patrolando de Jesuo kaj Maria. Ilia programo estis tiu, vivi « *laŭ la ordonoj de Kristo* » kaj « *laŭ la ekzemplo de la elstara filino de Ciono, Patrino de Dio kaj Patrino Nia* ».

Ĉi tiu spirita medio estis pli aktuala, familieca kaj stimula por tiuj ermitoj, pro la proksimeco de Nazareto, kiu memorigas la elstarajn virtojn (antaŭ ĉio, preĝon kaj pentofaron) de Jesuo kaj Maria. Jen, por la devotuloj de la Madono de l'Karmelo, la intima signifo de la skapulario, kiu estas ekstera kaj tuŝebla signo de la konsekriĝo al la Dipatrinino.

En 1726, Papo Benedikto 13-a plivastigis la feston de la Madono de l'Karmelo al la tuta latin-rita Eklezio. La liturgia celebrado, tamen, ekzistas ankaŭ en kelkaj orientaj ritoj, ekzemple en tiu maronita kaj en tiu alban-itala. Ĝi estas tre disvastiĝinta en Eŭropo kaj en Amerikoj, precipe en tiuj Centra kaj Suda, kie la *Reĝino de l'Karmelo* estas Patronino de tutaj landoj (Bolivio, Ĉilio, Kolombio, Peruo). Sed ĝi ankaŭ troviĝas en Azio, en Afriko kaj en Oceanio: sanktejoj ekzistas en Mikronezio, en Keralo (Hindio), en Kuvajto (kie ŝi estas honorata sub la nomo « *Nia Sinjorino de Arabio* ». Antaŭ ŝia bildo, la muzulmanaj virinoj bruligas kandelojn por peti aŭ danki okaze de naskoj; similaj faroj ankaŭ videblas en la Baziliko de Monto Karmelo en Israelo, kaj en la insulo Cebu/Filipinoj).

A.D.S.

HIROŜIMO

La hasta ritmo de la nuntempa vivo certe forgesigis al multaj, ke la 6-an de aŭgusto plenumiĝos 35 jaroj post la ĵeto de la unua atombombo, sur la japanan urbon *Hiroŝimo* (la dua sekvis sur *Nagasako*). Temas, kontraŭe, pri dato, kiun oni ne devas forgesi, sed kiu devas resti kiel porĉiama memorigilo por la tuta homaro.

Tiu 6-a de aŭgusto 1945, Hiroŝimo estis komplete detruita. 80 mil homoj mortis tuj, 120 mil restis vunditaj (kaj, el ili, multaj mortis en la postaj monatoj kaj jaroj, eĉ ankoraŭ nun, pro la sekvoj de la eksplodo). Tiuj, kiuj spertis tiun tragedion, nur pene sukcesas rakonti ĝin (*).

Tiu 6-a de aŭgusto markis la eniron, en la homan historion, de ebleco ĝis tiam ne konceptita: la ebleco, ke la homaro detruu sin mem. La sola vojo, por eliri el ĉi tiu inkubsonĝo, estas tiu nelacigeble indikita de Papo Paŭlo sesa (kiu, pretere dirite, kun frapa koincido mortis ĝuste en iu alia 6-a de aŭgusto): antaŭ ĉiò malarmigi la animojn, kaj, tuj poste, konkrete detruu ĉiujn ekzistantajn atombombojn.

Antonio De Salvo

(*) Ĵus aperis, zorge de japana Komitato, skua grandformata libro kun teksto en Esperanto, kiu prezentas, per multaj originalaj bildoj, tiun nekredoblan tragedion. La libro estas ricevebla senpage, ĝis elĉerpiĝo kaj kontraŭ pago de sendokostoj, ĉe UEA (Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, Nederlando).

KUN LA NEKREDANTOJ VENI EN INTERPAROLADON

En detala intervjuo ĉe Vatikana Radio Kard. König pritraktis la agadon de la Vatikana Sekretariejo por la Nekredantoj (de li gvidata), rerigarde al ties 15-jara ekzisto.

Kard. König nomas la dialogon kun la nekredantoj « *provoko por la kristanoj* », ĉar ĝi devigas ilin pliprofundigi sian kredon, kaj forigi ĉiun superstiĉan sintenon samkiel la iaman klerikalismon, kiuj ambaŭ sendube « *bedaŭrinde kontribuis al la disvastigo de ateismo kaj malkredo* ».

*El « Wiener Kirchen-Zeitung »
trad. Walter Mudrak, Aŭstrio*

Intertempe, Kard. König demisiis el la gvidado de la Vatikana Sekretariejo por Nekredantoj, lige kun tio, ke 3.8.1980 li iĝos 75-jara.

IKUE sincere gratulas al Kard. König pro lia jubileo, kaj esprimas sian dankemon pro la fakto, ke li simpatias al la katolika Esperanto-movado.

MARIA FARSETTI KAJ LA C.O. DE IKUE

Mi opinias, ke estas interese, ke la IKUE-anoj sciu, tra kiu vojo kaj en kiuj cirkonstancoj la Centra Oficejo de IKUE instalas sin en via Berni 9, Romo.

En la apartamento, nun grandparte okupata de IKUE, vivis dum multaj jaroj, kaj mortis 9.5.1953, la Di-servantino Maria Farsetti, kiu naskiĝis 16.5.1867 en Madonna degli Angeli (Prov. Raveno).

Ekde 1933, la asketa substrato de la animo de Maria Farsetti, pliigita kaj purigita de multaj vivsuferoj, iĝis hela fonto de mistikeco. Dum 20 jaroj ŝi (kiu estis ameme nomata « Panjo Maria »), ne eliris el sia hejmo, pro korpa malsano, kaj pasigis la tagojn suferante kaj preĝante. Ŝia ĉambreto, kie preskaŭ ĉiutage oni celebris S. Meson, iĝis iusence sanktejo, vizitata de ĉiusepacaj homoj, premataj de doloroj, turmentataj de kompleksaj problemoj, senesperaj kaj senkuraĝaj, kiuj alkuris por ricevi konsilon kaj konsolon. Multaj pendigis, ĉirkaŭ la bildoj de la Sankta Koro de Jesuo kaj de la Madono, dankesprimilojn pro ricevitaj difavoroj.

La dosiero por la beatigo de « Panjo Maria » estas prizorgata de tiucela Fondaĵo, ligita kun la Sanktejo de Madonna degli Angeli, naskiĝloko de Maria Farsetti. Ĉar la tiea Paroĥestro estas P. Angelo Duranti, konata Esperantisto, estas kompreneble, kiel povis okazi, ke la konservado de la apartamento de via Berni estis konfidita al IKUE.

IKUE kaj la Fondaĵo faras al si reciprokan komplezon: ja, IKUE zorgas pri la konservado de la apartamento, kaj la Fondaĵo gastigas senpage la Centran Oficejon.

Konvencio estis subskribita, tiucele, 4.9.1975; kelkaj modifoj kaj precizigoj estis faritaj 21.9.1978. Jen la nun valida teksto (en itala lingvo):

EN LA NOMO DE LA SANKTEGA TRIUNUO

Per ĉi tiu dokumento, redaktita en duobla originalo kaj valida por ĉiu jura efiko, oni difinas la sekvaĵon inter la Direkcio de la « Fondaĵo Farsetti » kaj la « Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista — IKUE », kiel konfirmon kaj kompletigon de tio, pri kio oni akordiĝis per akto de 4.9.1975:

1) La « Fondaĵo Farsetti » konsentas la ekskluzivan uzon, fare de IKUE, de la apartamento posedata en Romo (via Francesco Berni 9, 00185 Romo, unua etaĝo, ŝtuparo A, int. 3), konsistanta el tri ĉambroj, koridoro kaj alligita necesejo, postlasita per testamento de 22.3.1953, de la Diservantino Maria Farsetti, al la Tria Franciskana Ordeno.

2) En la dirita apartamento IKUE starigas, pere de sekretario, la Centron de la internacia katolika esperantista movado, reciprokante la senpagan uzon de la apartamento per religia gardado de la Kapelo sanktigita de la Diservantino Maria Farsetti, kaj ebligante al la fideluloj viziti ĝin kaj preĝi en ĝi; ĝi ankaŭ funkcios kiel centro de ŝia beatiga proceso.

3) Estas je kostoj de IKUE la elspezoj por elektro kaj telefono, dum restas je kostoj de la Fondaĵo Farsetti ĉiuj aliaj elspezoj, kaj aparte tiuj kunposedantaraj kaj ĉiuj tipoj de imposto.

4) En la unua ĉambro oni starigas la oficejon de IKUE kun la koneksa arkivo. En la Kapelo ĉiuj rajtigitaj Sacerdotoj povos celebri la Sanktan Meson aŭ prizorgi aliajn religiajn servojn; oni petas ĉiutagan preĝon laŭ la intencoj de la Fondaĵo Farsetti, kaj por la disvastigo de la katolika religio pere de Esperanto. La tria ĉambro povos esti, laŭplaĉe, privata ĉambro rezervita al la Sekretario de IKUE aŭ al alia kunlaboranto.

5) Ĉi tiu konvencio validas de 31.1.1978 ĝis 31.12.1999 (restas konfirmitaj, por la antaŭa periodo, la reguloj fiksitaj per la citita akto de 4.9.1975), escepte de la kazo ke, pro neantaŭvideblaj kaŭzoj, iĝos necese modifi aŭ forigi iun klaŭzon; tiam oni agos laŭ komuna interkonsento.

6) Dum ne estos efektivitaj la iniciatoj de la Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj — IABO, inter kiuj ĉefe la ekumena traduko de la Sankta Biblio, IKUE kunlaboros en tiuj iniciatoj, laŭ siaj eblecoj.

7) Ĉion, kio ne estas eksplicite antaŭvidita en ĉi itu akto, oni faros laŭ komuna interkonsento, laŭ la bezonoj, harmonie kun la itala leĝo.

Romo, 21.9.1978

Por « Fondaĵo Farsetti »
Angelo Duranti

Por IKUE
Czesław Biedulski
Antonio De Salvo
Joseph Christiaens
Egidio Paweł Tic



Tama kunveno en la C.O. de IKUE: (de maldekstre) E.P.Tic, G. Jacobitti, A. Duranti, J. Korytkowski, J. Zielonka

KUNLABORO

De la 9-a ĝis la 12-a de majo okazis en Budapeŝto (Hungario) kunveno de hungaraj kaj polaj esperantistoj. Apud la esperantista celo, ankaŭ evidentiĝis iu eklezia misio, ĉar oni okazigis, interalie, renkontiĝon kun poloj (neesperantistaj) loĝantaj en Budapeŝto. En la hungara ĉefurbo, ja, en la kvartalo Kőbánya, poloj konstruis al si, antaŭ jardekoj, preĝejon kaj kulturdomon; sed la lastaj jaroj forprenis la polan pastron kaj la kulturdomon (kiu fariĝis domo por hungaraj maljunuloj). Pro manko de pola pastro, la religia vivo de la pola preĝejo ege kadukiĝis, malgraŭ la penoj de la hungara animzorganto (kiu ne konas la polan lingvon). La alveno de la polaj esperantistoj estis okazo por denove pleniĝi la preĝejon, ĝis la lasta loko, dank' al invitoj al la budapeŝtaj poloj, afable dissenditaj de la hungara pastro.

La 11-an de majo, antaŭ la Meso, la hungara animzorganto (P. Gyula Párádi) salutis latine kaj hungare. La Meson celebris P. Józef Zielonka; la legaĵoj kaj kantoj sonis pole kaj hungare. La prediko (de P. Zielonka mem) temis, interalie, pri la unueco de la Eklezio malgraŭ la baroj de lingvo, nacio kaj kulturo.

Posttagmeze de la sama tago, okazis esperantista S. Meso en la Kapelo de S. Kristoforo. Partoprenis pli ol 35 personoj, el kiuj preskaŭ duono protestantoj. Kuncelebris P. Ferenc Nadi kaj P. Józef Zielonka. La budapeŝta ŝafaro, kvankam ne multnombra, konsistas el tre fervoraj agantoj, kies oferema ĉefo estas P. Nadi, kiu, por la ĉiumonata Esperanto-Meso, veturas al la ĉefurbo el preskaŭ 200-kilometra distanco.

Witostawa Mazur, Pollando

KIEL AKTIVIGI LA JUNULARON?

Dimanĉon 14.9.1980 okazos, en la pilgrimloko Banneux apud Lieĝo (Belgio), la 5-a Internacia Pilgrima Kunveno Esperantista. La temo estos: « *Kiel aktivigi la junularon en la Eklezio per Esperanto?* »

La pilgrima tago havos lokon en la Instituto « *Mater Dei* » (Banneux-Louveigné). Patro L. Bourdon (Francio) kaj s-ro W.A.M. van Heugten (Nederlando) mallonge enkondukos la temon; sekvos diskuto. Estas antaŭvidita Meso en Esperanto (en la Kapelo de la Instituto). Oni vizitos la « *Fonton por ĉiuj nacioj* » kaj la Internacian Kapelon de S. Miĥaelo.

Partoprena kotizo: 120 belgaj frankoj aŭ egalvaloro. Informoj ĉe P. Louis Bourdon, 7 av. Salomon, F-59800 Lille, Francio.

NE POR LERNI LA ITALAN VENIS MI AL ROMO !

En 1971, je la aĝo de 14 jaroj, enironte mezlernejon (la usona termino estas « *high school* » aŭ « alta lernejo »), mi devis fari decidon, la unuan decidon de mia akademia vivo. « *El la kvar fremdaj lingvoj, kiujn oni instruas en nia lernejo, kiun vi studos?* ». La elekteblaj lingvoj estis: la franca, la hispana, la germana, la latina. Pripensante la aferon, mi rezonis tiele: « *Mi ne volas studi la lingvon de unu lando, aŭ de unu grupo da landoj; ĉar mi havas intereson pri la tuta mondo. Oni diras, ke la latina havas pozicion de universaleco tra la tuta mondo. Kvankam homoj ĝenerale ne ĝin parolas, ankoraŭ ĝi gravas tutmonde en kelkaj profesioj: ekzemple, juro, kuracado, biologio, pastreco. Tial mi studos la latinan* ». Mi tiam ne sciis, ke mi pensas kiel tipa usona pragmatisto. Laŭ mi, lingvo interalie estas pragmatisma ilo. uzenda por kontakti kiel eble la plej grandan nombron kaj diversecon da homoj. Sub tiu analizo, la latina ŝajnis esti la plej povplena ilo por atingi miajn pragmatismajn celojn. Do, mi studis la latinan en mezlernejo.

Kiam mi eniris mezlernejon, mi intencis sekvi la vojon al la profesio de arkitekto. Sed io aŭ iu ŝanĝis mian menson kaj koron dum la tria jaro de mia kvarjara mezlerneja kurso, kaj mi decidis studi por la pastreco de mia diocezo. Mi gratulis min pro mia saĝa decido studi la latinan — « *ĉar* », mi diris, « *la latina estas la lingvo de la Eklezio! Miaj studoj en la seminario estos pli facilaj, dank' al la latina!* ».

Mi eniris la diocezan seminarion en 1975. Supozeble mi povas diri, ke la latina ja « helpis » min tie. Oni aŭtomate metis min en porkomencantan latinkurson: stulta afero, sed almenaŭ la laboro ne estis peza por mi! Post kelkaj semajnoj en la seminario, mi lernis feliĉan fakton: kvankam la plimulto de la seminarianoj de mia diocezo studas teologion en St. Louis, Misurio, kelkaj-kun permeso de la Episkopo-rajtas iri al Romo por studi. Tiu aranĝo ŝajnis al mi esti respondo la malklara revo de mi. ROMO! La centro de la Universala Eklezio! La persono, kiu iras tien, povas renkonti katolikojn de la tuta mondo, kaj profunde lerni pri la ĝojoj kaj la problemoj de kredantoj ĉie. Tra mia tuta vivo, mi posedis emon « lerni ĉion », aŭ almenaŭ lerni en totala maniero; tial Romo ŝajnis al mi esti perfekta. Denove mi gratulis min pro mia saĝa decido studi la latinan en mezlernejo. « *Jen mi iros al Romo, la patrina urbo de la latina! Sendube la latina estos ege uzebla tie. Certe tie oni instruas teologion en la latina* ».

Sed baldaŭ mi lernis, ke ne: oni instruas teologion, ĉe la Pontifika Gregoria Universitato, la universitato al kiu mi estis destinita, nur en la itala! (Mia katolika mezlernejo ne agnoskis la « gravecon » de la itala en internaciaj katolikaj universitatoj!) Malgraŭ ĉi tiu malagrablaĵo, mi intencis peti permeson por iri al Romo. Mi ankoraŭ havis multe da tempo por zorgi pri la itala. Kion ajn la estonteco portos, ĝi portos!

Ĝi portis Esperanton en mian vivon. Dum la somero de 1976, mi tute hazarde trovis intereseĝan libron en biblioteko: *The Languages of the World* (La Lingvoj de la mondo) de Kenneth Katzner (Mi rekomendas ĉi

tiun libron al ĉiuj uzantoj de la angla. Mi ne scias, ĉu ĝi estas havebla en aliaj lingvoj). Ĉi tiu libro enhavas ekzemplerojn kaj mallongajn diskutojn pri 500 diversaj lingvoj-inkluzive de Esperanto, pri kiu Katzner pentras tre favoran bildon. Mi jam estis aŭdinta pri Esperanto, kaj mi renkontis nenian obstaklon pri ĝia supozita « artefariteco » (en la senco de « netaŭgeco por homa uzo »), sed mi mise pensis, ke Esperantistoj volas forigi ĉiujn aliajn lingvojn kaj uzi Esperanton sole. Kiam mi lernis, ke Esperantistoj proponas la lingvon por gardi la lingvajn rajtojn de ĉiuj, mi eksimpatiiis kun la Esperantistoj.

Mi decidis Esperantistiĝi kiam mi lernis pri la Katolika Movado, pere de *Esperanto: The World Interlanguage* (Esperanto: la monda interlingvo), inter kies kunaŭtoroj estas IKUE-anoj Patro J. B. Kao kaj D-ro William Solzbacher. Mi pensis: « *Certe la Katolika Eklezio, tutmonda kia ĝi estas, devas uzi Esperanton-precipe en internaciaj universitatoj, se oni ne uzos la latinan* ».

Tri jaroj pasis. Mi iĝis membro de IKUE kaj UEA; mi lernis Esperanton pere de korespondkurso de la usona branĉo de IKUE; mi komencis korespondi kun pola seminariano; mi iĝis redaktoro de la novaĵletero de la usona branĉo de IKUE. En aprilo 1979 mia Episkopo donis al mi la definitivan « *jes* » pri Romo. Kaj la fakto frapis min: nun mi devas lerni la italan!

Kiel mi diris antaŭe: laŭ mia pragmatisma menso, lingvo estas ilo. Do mi volas akiri ion, kio funkcias kiel eble plej universale. Mi ne volas havi multajn superflujajn, specialigitajn ilojn. Jam mi lernis la latinan pro ĝia supozita universaleco. Ankaŭ, mi lernis la novtestamentgrekan, por ke mi povu legi parton de Sankta Skribo en la originalo. Kaj mi lernis Esperanton ĉar ĝi servas kiel ilo vere internacia. Sed nun oni proponas, ke mi akiru alian ilon: la italan.

Ne por lerni la italan intencis veni mi al Romo. Kiel mi diris antaŭe, mi intencis veni por pli bone koni la popolon de Dio, kiu estas disvastiĝinta tra la mondo, sed kiu rigardas Romon kiel sian spiritan centron. La lernado de la indiĝena lingvo estas ĝeno simila al la neceso akiri pasporton. Kiu vojaĝonto vere volas elspezi 20 dolarojn por akiri libreton, kiu enhavas nenion interesan krom malbelan foton de la posedanto? Neniu. Oni devas porti ĉi tiun dokumenton ĉien dum la vojaĝo, ĉiam timante pri ĝia eventuala perdo. Post la vojaĝo, kvankam la pasporto validas kvin jarojn, ĝi estas tute senutila en la hejmlando. Do la pasporto kuŝas en tirkesto kaj kovriĝas per polvo. Simile pri la lernado de etna lingvo: oni elspezas monon kaj tempon por lerni la lingvon de la lando, kie oni studos. Kiam oni alvenos, oni ĉiam timas, ke sia lingvouzo ne estas sufiĉe bona (kaj prave oni timas!). Post la tempo en la alia lando, oni hejmeniras, portante en la menso ilon tute senutilan. Almenaŭ, per pasporto, oni povas iri al pluraj landoj. Sed kiu lernas la italan akiras ilon uzeblan nur en unu lando! Kia frenezeco por la tutmonda popolo de Dio! Pasporto estas fakto de vivo. La neceso lerni multajn etnajn lingvojn ankaŭ estas fakto de vivo; sed, kiel ni Esperantistoj scias, ĝi estas fakto, kiu ne devas daŭri.



Kevin Laughery en Romo

Nun, dum mi estas en Romo, mi plene spertas la eklezian lingvo-problemon. Pri la problemo ĉe la Universitato, mi skribos pli detale en venonta artikolo; nun sufiĉas mencii la nekredeblan sencon de ironio, kiun mi sentas dum mi parolas kun miaj usonaj kolegoj pri la evidenta taŭgeco de Esperanto kiel solvo por lingvoproblemoj. Eĉ se ni povas preteriri la ofte esprimatajn, nelogikajn timojn pri « artefariteco », miaj kolegoj - viktimoj kun mi de efektiva (kvankam ne intence malica) diskriminacio - rifuzas tiun sorton. « *Ni loĝas en Italujo* », ili diras; « *tial, studi en la itala estas la plej bona solvo* ». Jes, ni loĝas en Italujo, sed dum nur kvar aŭ kvin jaroj; kaj je la servo de Eklezio, *kiu ne estas itala*.

Meze de ĉi tiu konfuzo, almenaŭ mi povas resti kontenta je unu fakto - tio estas, ke ankoraŭ mi gratulas min pro mia saĝa decido studi la latinan en mezlernejo. Kial? Ĉar, kiel ĉiu teologo scias, la latina, kune kun la greka, staras kiel neforgesebla parto de la eklezia heredaĵo. Gravus, ke ĉiu teologia studento konu ilin ambaŭ por kompreni la diversajn dogmajn problemojn, kiujn la Eklezio spertis dum sia historio - ekzemple, la problemojn pri la difino de la dogmo pri la Sankta Triunuo. La greka kaj la latina ja estas partoj de nia heredaĵo; sed nek unu nek la alia taŭgas hodiaŭ kiel povplena komprenilo inter la popoloj, kiuj konsistigas la Eklezion, kaj kiuj sopiras por pli bona interkompreno - eĉ en la romaj universitatoj. Mi ĝojas koni la du grandajn lingvojn, kiujn la Eklezio pasintecce uzis pro kialoj de internacieco; kaj mi ĝojas partopreni en la laboro por antaŭenigi trian lingvon, por plenigi la hodiaŭan vakuon.

Kevin Laughery, Usono/Vatikano

● La katolika Eklezio estas, en Svedio, malgranda minoritato (ĉirkaŭ 1% el la loĝantaro). De 1945 ĝis hodiaŭ, la nombro de la katolikoj kreskis rapide, de 7.000 al 100.000: sed temas, plejparte, pri migrintoj al Svedio post la dua mondmilito, pro politikaj aŭ ekonomiaj kaŭzoj; pro tio, ili nur pene atingis ioman unuecon.

La rilatoj inter la katolika Eklezio kaj la sveda ŝtata Eklezio estas bonaj, malgraŭ kelkaj tiklaj punktoj (ekz., la rilatoj kun la registaro, ĉar la sveda Eklezio havas la statuson de ŝtata religio).

Dum tre longa tempo, preskaŭ oni ne konis, en Svedio, eĉ la ekziston de la sveda katolika minoritato. Nuntempe, tiu minoritato estas (kaj restos) tia, sed ĝi atingis ioman gravecon: oni pridemandas ĝian opinion kaj oni petas ĝian konsilon.

La sveda junularo montras intereson al katolikismo. La kaŭzoj de tio ne estas klaraj: eble temas pri scivolemo rilate nekonatan aferon, sed eble ankaŭ pri konsciigo, ke en la katolika Eklezio oni povas trovi gvidlinion kaj helpon, por superi kaj solvi la problemojn de la vivo.

● Jam de kelka tempo aperas regule, en EK, la « *Papaj preĝintencoj* » por la unuopaj monatoj. Temas, pli precize, pri la preĝintencoj proponataj de la internacia Movado « *Apostolado de la Preĝo* », aprobataj de la Sankta Patro.

La preĝintencoj devenas el sugestoj de la diversnaciaj sekcioj de la Movado. La Papo kelkfoje anstataŭigas iun intencon, kelkfoje modifas iun alian; poste, ili estas disvastigataj al la tuta mondo.

La « *Apostolado de la Preĝo* » naskiĝis en 1844, pro iniciato de la spirita konsilanto de la jezuitaj studentoj de Vals (Francio). Li kutimis proponi al tiuj studentoj, en la festotago de Sankta Francisko Ksavero, ĉi tiun penson: « *Vi volas iĝi misiistoj, kaj iri al malproksimaj landoj por prediki la Evangelion. Vi estas nun en tempo de pretiĝo kaj studo, do vi ne povas iri tien. Sed tio ne devas malebligi, ke vi jam nun estu taŭgaj misiistoj kaj apostoloj. Tion vi povas atingi per la preĝo kaj la ofero de via vivo* ».

● Suda Koreo havas tre junan, sed vigan katolikan Eklezion. Ĝi naskiĝis antaŭ du jarcentoj, sed la unua jarcento vidis teruran persekuton. Post kelktempa libereco, denovaj malfacilaĵoj okazis dum la japana regado. Tiel, je la fino de la dua mondmilito, en Koreo ekzistis nur 180.000 katolikoj. Hodiaŭ ili estas 1.200.000, kaj ĉiujare okazas 40 ĝis 50 mil konvertiĝoj, precipe ĉe kleruloj kaj universitatanoj.

La sacerdota vokiĝo estas tre multnombraj: en la ĵus finiĝinta lernojaro, ĉirkaŭ 100 kandidatoj ne povis eniri Seminarion pro manko de liberaj lokoj. Pro tio, oni nun planas konstrui novan Seminarion. Pro tiu abundo de

vokiĝoj, baldaŭ koreaj sacerdotoj iĝos misiistoj: korea misio jam ekzistas en Peruo. Deklaris, pri tio, la korea Episkopo Angelus Nam Sou Kim: « *Ni estis evangelizitaj de misiistoj. Nun, post ducent jaroj, ankaŭ ni povas helpi la aliajn gefratojn, kiuj petas la ĉeeston de sacerdotoj* ».

● La unua kompleta konkordanco de la Biblio (indekso de ĉiuj vortoj de la verko, kun cito de ĉiuj lokoj, kie la vorto estas uzata) aperos, en la lingvoj hebrea, greka, latina, angla kaj franca, zorge de la benediktanaj monaĥoj de Maredsous (Belgio).

Sub la gvido de P. Boswick kaj De Borchgrave, 12 monaĥoj, specialistoj pri informadiko, plenumis, per elektrona komputilo, ĉi tiun monumentan kaj unikan verkon, kiu havos 1.200 paĝojn en kvin volumoj.

Guste en la 15-jarcenta datreveno de la naskiĝo de S. Benedikto, liaj monaĥoj renovigas la bibliajn esplorojn per informadiko. « *La mezepokaj benediktanoj — diris, pri tio, P. Boswick — estis famkonataj, ĉar ili disvastigis la Biblion kopiante ĝin. Hodiaŭ, per nia banko de bibliaj informoj, ni havas kvar aŭ kvin jarojn da avantaĝo kompare kun ĉiuj aliaj bibliistoj* ».

● La katolika Eklezio en Usono klopodas, jam de kelkaj jaroj, atingi la 70 milionojn da usonanoj, kiuj apartenas al neniu religia konfesio.

La situacio en Usono profunde ŝanĝiĝis, ja, kompare kun la pasinteco. En la unuaj du jarcentoj de la usona historio, la Eklezio en Usono okupiĝis precipe pri gardado de la kredo de la katolikaj enmigrintoj, meze de nefavora socio. Nun la katolika Eklezio en Usono iĝis sufiĉe forta, por ke ĝi povu okupiĝi pri apostola agado pli vasta, nome pri la evangelizado de tiuj 40% da usonanoj, kiuj (laŭ la usona esprimo) estas « *senekleziaj* ».

La agado ankaŭ celas okupiĝi pri la 12 milionoj da usonaj katolikoj, kiuj ne partoprenas aktive en la Eklezio.

Laŭ kelkaj esploroj, ŝajnas, ke la meza « *seneklezia* » usonano estas viro, needzigiinta, ĉirkaŭ 30-jara, kun meza klereco, en mezbonaj ekonomiaj kondiĉoj, kaj loĝanta laŭlonge de la Pacifika marbordo.

● Preskaŭ 5.000 homoj haltas, ĉiujare, ĉe la mondkonata Monaĥa Rifugejo de Monto Granda S. Bernardo, fondita en 1049 de Bernardo, ĉefpastro de Aosto (Italio), sur la svisa flanko de Alpoj, laŭlonge de la malnova strato konstruita en la jaro 12 antaŭ Kristo de la romia imperiestro Aŭgusto.

La Rifugejo, situanta je 2.473-metra alteco, naskiĝis por gastigi la vojirantojn, kaj ilin protekti kontraŭ la atakoj de la rabistoj kaj de la naturo. Ankoraŭ nun la Rifugejo estas tre vizitata, sed ne pro la iamaj kaŭzoj. Fakte, la nunaj gastoj alvenas post trihora skiado, por mediti kaj preĝi kun la aŭgustenaj monaĥoj, fronte al neforgesebla, neĝkovrita panoramo. Ĉiutage, la monaĥoj preĝas, por ke ilia ĉeesto sur tiu monto favoru la transdo-

non de la dia graco, kaj ke, ĝuinte la belecon de la naturo, la vizitintoj reiru al siaj ĉiutagaj taskoj pli serenaj kaj pli fortaj en la servo al Dio kaj al la gefratoj.

● Revolucia, sed tre inteligenta propono, estis prezentita de itala Episkopo, Mons. Costanzo Miccio, por solvi la problemon de sacerdotaĵi vokigoj.

La propono baziĝas sur premo tre simpla, eĉ memkomprenebla. Kiam mortas sacerdote 60-jara, oni diras: « Domaĝe! Li estis juna. Li ankoraŭ estus povinta multon fari por la Eklezio! ». Nu, en nia epoko, en kiu la homoj iĝas pensiuloj en ĉiam pli juna aĝo, daŭre kreskas la nombro de tiuj kiuj, kvankam ankoraŭ en bonaj sankondiĉoj, estas devigataj resti senokupaj. El tiuj, pluraj estas needziĝintaj, aliaj vidvaj, sen filoj aŭ kun filoj jam memstaraj. Kaj, el ili, estas pluraj, kiuj iam pensis sacerdotaĵi, sed kiuj, poste, ne tion faris, pro diversaj cirkonstancoj.

Laŭ Mons. Miccio, la vojo de la sacerdotaĵo estas ankoraŭ malfermita al tiuj homoj, eĉ se, hodiaŭ, nemultaj el ili kuraĝas sin proponi, ĉar la afero estus nova, aŭ ĉar ili ne emas travivi la sperton de la kutimaj seminarianoj. « *Sed — skribis Mons. Miccio — oni povus trovi la manieron prepari tiujn homojn en taŭga formo, profitante de tio, kion ili jam scias, kaj en rilato kun apartaj sacerdotaĵi taskoj, kiujn oni povus konfidi al ili* ».

Sub la respondeco de Mons. Miccio, oni starigis, tiucele, eksperimentan centron, ĉe la kamaldulana monaĥejo de Montegiove (dioc. Fano).

● La nova maniero, en kiu la roma Episkopo plenumas sian oficon en la katolika Eklezio, estis substrekita de Papo Johano Paŭlo dua 22.5.1980: « *Ŝajnas — li diris — ke, post la dua Vatikana Koncilio, li ne povas plenumi sian oficon alimaniere ol elirante renkonte al la homoj, do al la popoloj kaj al la nacioj, en la spirito de la tiel klaraj vortoj de Kristo, kiu ordonas al la apostoloj iri al la tuta mondo kaj instrui « ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomo de l' Patro, de l' Filo kaj de la Sankta Spirito* » (Mt. 28:18). *Jam Johano 23-a antaŭvidis ĉi tiujn eblecojn, kaj Paŭlo sesa ilin vaste efektivigis. Tio, sendube, estas ankaŭ ligita kun la progreso de la modernaj komunikiloj, sed, precipe, estas ligita kun la nova misia konscio de la Elezio, ŝuldata al la dua Vatikana Koncilio. Oni povas diri, ke, post tiu Koncilio, eblas plenumi oficojn en la Eklezio nur en la kadro de tiu misia konscio* ».

● « *Misio neniam estas detruo, sed ĝi estas rekiro de valoroj kaj nova konstruo* ». Johano Paŭlo dua esprimis ĉi tiun penson en sia unua Encikliko. Antaŭ nelonge, li pli vaste pritraktis ĝin, en mesaĝo, kiun li sendis al ĉiuj katolikoj prepare al la Tutmonda Misi-Tago (21.10.1980).

En la mesaĝo, la Papo rimarkigis, ke la misiisto kontaktiĝas kun la naturaj, personaj, kulturaj valoroj de la homo. Fronte al ĉi tiuj valoroj, la anoncanto de la Evangelio devos havi sintenon de atenta kaj respektplena pripenso, zorgante, ke tiuj valoroj neniam estu sufokataj, sed savataj kaj

evolugataj. « *La baza sinteno de la misisto estas tiu proponi, ne altrudi la kristanan veron. Tio estas postulata, antaŭ ĉio, de la homa digno, kiun la Eklezio, laŭ la ekzemplo de Kristo, ĉiam defendis kontraŭ ĉiu misa altrudo, ĉar de tiu digno la libero estas premiso fundamenta kaj nerezignebla. Tio estas postulata, krome, de la naturo mem de la kredo, kiu povas naskiĝi nur el libera akcepto* ».

La misia agado, laŭ la Papo, devas elstarigi kaj maturigi, puriginte ilin el la mis-aldonoj akumuligintaj tra la jaroj, la aŭtentikajn valorojn de religio kaj amo, kiuj, « *signoj de la ĉeesto de Dio* », malfermas la vojon al la akceptado de la Evangelio. Tiamaniere la Eklezio « *kontribuos al la starigo de nova kaj universala civilizo, kiu, netuŝante la tipajn aspektojn de la diversaj etnaj-sociaj medioj, atingos sian perfektecon en la alprenado de la pli altaj evangeliaj enhavoj* ».

● La nombro de la nekredantoj rimarkinde pliiĝis en Aŭstralio. Inter 1971 kaj 1976, la aŭstralia loĝantaro kreskis preskaŭ 800.000, dum, en la sama periodo, la aŭstralianoj, kiuj deklaras sin neapartenantaj al iu ajn Eklezio, kreskis pli ol 1.100.000, tiel ke la kristana loĝantaro malkreskis 350.000.

Laŭ kelkaj interpretoj, la fenomeno ne estas reala, sed ŝuldiĝas nur al la fakto, ke la homoj ĵus akiris la kuraĝon konfesi ion, kio jam pli frue ekzistis, nome, la mankon de religia kredo. Sed, laŭ malpli optimismaj opinioj, estas ĉiukaze serioza afero, ke la homoj publike distancigas sin de la Eklezioj, kaj ke falis tiuj sociaj motivoj, kiuj subtenis la homojn en la praktikado de iu kredo.

NI DANKAS

Donacis monon al IKUE:

Belgio: Christiaens, Pirlot; *F.R. Germanio:* Eder Josef; *Italio:* De Salvo, Gabrielli, Magnani; *Novzelando:* Hamvai; *Usono:* Marr, Weddell.

Donacis Esperantaĵojn al IKUE:

Aŭstrio: Mudrak; *Brazilo:* Urbaitis; *F.R. Germanio:* Kondor; *Italio:* Angiolino, De Salvo, Gabrielli, Jacobitti; *Luksemburgio:* Kindler; *Pollando:* Fiutak.

Al ĉiuj donacintoj, multajn dankojn.

KUNCELEBRADO EN STOKHOLMO

Dum, ĝis antaŭ nelonge, ŝajnis, ke neniu katolika pastro partoprenos en la 65-a Universala Kongreso de Esperanto en Stokholmo/Svedio (v. EK 5/1980, p. 68), nun estas antaŭvideble, bonŝance, ke tie povos eĉ okazi kuncelebrado en la internacia lingvo. Fakte, certigis sian partoprenon P. Ludwig Thalmaier (F. R. Germanio); kaj, verŝajne, ankaŭ ĉeestos P. Louis Bourdon (Francio) kaj P. Johano B. Kao (Tajvano).

PAPAJ PREĜINTENCOJ POR SEPTEMBRO

Ĝenerala: por ke la kuracistoj kaj la flegistoj donu al la malsanuloj, kune kun la kuracado je kiu ili estas devigitaj, ankaŭ pruvon de humaneco kaj frateco.

Misia: por ke ĉiuj kristanoj, pere de la Pontifikaj Misiistaj Agadoj, partoprenu en la zorgo de l' Papo en la evangelizado.

TEMO POR EKUMENA KONGRESO

Oni serĉas temon por la venontjara Ekumena Kongreso IKUE-KELI. Ĝis nun estas ĉi tiuj proponoj: « *Ni estas homoj inter homoj* » (Degrelle); « *Enkonduki Esperanton en kristanajn mediojn estas profetaj signoj kaj rimedo al unuigo* » (Magnani). Pliaj proponoj estas bonvenaj.



Ĉirkaŭ 30 personoj partoprenis en la « *Printempaj tagoj* » en Asizo, Italio (v. EK 3/1980, p. 35), de la 24-a ĝis la 27-a de aprilo

LEGANTOJ SKRIBAS

● Nia sekvonta IKUE-Kongreso, laŭ la plano farita en Luksemburgo, okazos en Nederlando. Sed ĉu vere tiu lando estas la plej konvena?

Nun ni batalas, por ke nia Movado trovi pli grandan interesigon en la Eklezio; ni deziras, ke la Papo salutu ankaŭ en Esperanto. Ni esperantistoj scias, kiel multe povas nia lingvo helpi la kristanojn en ekumenismaj interrilatoj, kiel multe helpas Esperanto en katolikaj kontaktoj, kiel multe Esperanto povas helpi en la disvastigo de la Evangelio, de la Dia Vorto en la tuta mondo. Sed pri tiuj ĉi valoroj de Esperanto, ni devas konvinki ankaŭ aliajn, antaŭ ĉio ni devas montri al la Eklezio tiujn universalajn valorojn.

Mi opinias, ke estus bone organizi nian sekvontan IKUE-Kongreson en Romo. Ne gravas, ke Kongreso jam okazis en tiu ĉi urbo. Nun, kiam la Papo estas polo, kiu iam estis protektanto de la IKUE-Kongreso en Ĉenstoĥovo, tucerte li akceptos la kongresanojn el la tuta koro, benos ilin kaj povos multe influi por nia Esperanto-movado. Se la afero dependus de mi, mi proponus organizi IKUE-Kongreson en 1981 en Romo. Mi pensas, ke okaze de Kongreso la Sankta Patro ne nur salutus nin en Esperanto. Kaj ĝuste tion ni bezonas, por propagandi nian Movadon en la Eklezio, inter la pastraro, kiu ne ĉiam ŝatas tiun lingvon. Se la Papo mem apogos Esperanton, tiam pli facile disvolviĝos nia movado en la ekleziaj medioj.

Bogusław Sobol, Pollando

Mi opinias, ke multaj IKUE-anoj faris al si la samajn demandojn de s-ro Sobol, kaj verŝajne ankaŭ donis la samajn respondojn. Tamen, mi estas konvinkita, ke IKUE-Kongreso en Romo ne povos okazi en 1981.

Antaŭ ĉio, mi diru, ke mi ne povis (bedaŭrinde) partopreni en la Kongreso de Luksemburgo, kaj, do, mi ne scias, kial oni elektis Nederlandon por la komuna Kongreso IKUE-KELI de 1981 (tion povus klarigi la ĉeestintoj). Sed mi supozas, ke la elekto baziĝis sur du ĉefaj konsideroj: nederlandoj sin proponis (dum romanoj ne faris tion); kaj, la Kongreso de 1981 ne estos nur Kongreso de IKUE, sed *komuna* Kongreso IKUE-KELI, kaj do oni devas elekti lokon, kiu estu akceptebla de ambaŭ Asocioj.

Romanoj ne sin proponis pro la simpla fakto, ke la roma esperantistaro ĝenerale, kaj tiu katolika aparte, ne estas sufiĉe forta por aranĝi tian kongreson. Oni povos rebati, ke IKUE-Kongresoj en Romo jam okazis en ne tro malproksima pasinteco (laste, en 1975), kaj ke, do, mia opinio estas tro pesimisma. Eble. Sed mi estas konvinkita, ke la fortoj je dispono ne sufiĉus por aranĝi Kongreson de IKUE-KELI (cetere, la Itala Esperanto-Federacio ĵus decidis okazigi en Romo, en septembro 1981, la Italan Kongreson de Esperanto: nu, en la konkerna estrara voĉdonado, *ĝuste la romaj estraranoj sindetenis*, kio pravas, ke mia opinio ne estas izolita).

Rilate la komunecon de la Kongreso kun KELI, mi ne estas tute certa, ke Romo estus plene akceptebla por tiu Asocio. Kvankam la rilatoj inter katolikoj kaj kristanoj de aliaj konfesioj estas, nuntempe, tre pli glataj ol iam (sufiĉas pensi je la ĵusa memorigo, fare de la Papo mem, de la 450-jara datreveno de la *Confessio Augustana*, kiu staras ĉe la bazo de luteranismo), kaj kvankam la esperantistaj katolikoj kaj kristanoj havas, ĝenerale, eĉ pli ekumenan inklinon ol tiuj neesperantistaj, oni ne povas nei, ke Romo estas ankoraŭ iu *simbolo*, kiu ne ĝuas kompletan ŝaton fare de nekatolikoj. Pro similaj kaŭzoj, cetere, ne estis akceptita la propono okazigi la ekumenan kongreson 1981 en Lurdo (Lourdes/Francio). Nederlando, kontraŭe, havas tre pli nuancitan aspekton; en ĝi kunvivas katolikoj kaj kristanoj, kvankam kun multaj problemoj (kiel pruvis la ĵusa Sinodo de la nederlanda episkoparo, kiu devis alfronti, interalie, ĝuste la neklaritan situacion devenantan el la fakto, ke en Nederlando la starpunkto de katolikoj estas ofte tre proksima al tiu de alikonfesiaj kristanoj). Por esti sincera, eble Nederlando povas vekti ioman «suspektemon» flanke de katolikoj (precipe polaj kaj italaj); sed mi ne kredas, ke ĝi estas *simbolo* samkiel Roma.

La suprajn klarigojn mi ŝuldis al vi, kara amiko, sed ankaŭ al aliaj IKUE-anoj (inkluzive de mi mem). Sed mi volus aldoni unu plian konsideron. Prave aŭ malprave, jam antaŭ unu jaro estis decidite, ke la Kongreso 1981 okazos en Nederlando; nun ne plu estas eble ŝanĝi tiun decidon, ĉar jam la organizado startis, kaj pro lojaleco IKUE devas ĉiurimede subteni la Kongreson en Nederlando.

Antonio De Salvo

● Mi nuntempe verkas legolibron, kun tre varia enhavo. Inter miaj centoj da informetoj, mi deziras, se eble, mencii la patronan Sanktul(in)on de la katolika esperantistaro. Mi kredas ke mi legis ion pri tio, antaŭ kelkaj jaroj, kaj malsaĝe mi ne notis ĝin tuj. Se ekzistas tia patrono, mi petas vin informi min. Mi scias, ke ekzemple Sankta Tomaso la Akvinano, kies emblemo estas ja stelo, patronas klerigadon, kaj ke Sankta Barnabo patronas pacigemulojn; sed ĉu ne estas iu Sanktulo, kiu aparte patronas viajn laborojn? Nu, povus esti Sankta Francisko, kun sia «*Disinĵoro, igu min instru-mento de via paco*», sed mi ne povas nur konjekti, mi bezonas kontrolitajn faktojn. Mi posedas karton pri Nia Sinjorino de la Espero, sed mia memoro estas, ke temas ankaŭ pri iu Sanktulo speciala.

El Britio

Fakto estas, ke la Patronoj de la katolikaj esperantistoj ne estas unu, sed...kvar! *Nia Sinjorino de la Espero* estis proklamita Patronino de la Esperantistoj jam en la 4-a IKUE-Kongreso (Romo 1913); *Sankta Francisko el Asizo*, kiel vi prave supozis, estas konsiderata Patrono de la Esperantistoj

pro sia amo al la paco kaj al ĉiuj kreitaĵoj (kvankam mi ne havas precizajn indikojn pri la formala atribuo al li de la patrona titolo, ĝi, tamen, troviĝas jam en publikaĵoj de antaŭ kelkaj jardekoj); *Pio 10-a*, kiu montris varman simpatian al Esperanto, estis proklamita Patrono dum la 23-a IKUE-Kongreso (Munkeno, FRG, 1951); fine, en la Statuto de IKUE (akceptita en Ĉenstohovo, Pollando, en 1977) estas indikita kiel Patrono, kune kun S. Pio 10-a, *Maksimiliano Kolbe*, kiu ankaŭ montris simpatian al Esperanto.

Antonio De Salvo

● Leginte la lastajn jarkolektojn de EK, mi rimarkis jenon.

La titolo mem de la IKUE-organo multe promesas al la legantoj; sed, almenaŭ nun, pri la esenco de ĉi tiu «*Espero*» oni povas trovi ne tro multe en ĝi. Enestas diversaj artikoloj (ekz. pri la vivo de la Eklezio, pri la agado de la Papo, pri nia Esperanta katolika movado, ktp); oni povas certe konstati, ke la enhavo de ĉiu numero estas sufiĉe riĉa kaj divers-speca.

Sed mankas al mi (kaj, eble, ne nur al mi), en nia revuo, io plej grava, io, kio plene pravigus ĝian titolon: *mankas konstantaj paĝoj dediĉitaj al la esenco kaj principoj de nia katolika kredo*.

Laŭ mi, en ĉiu numero, sur unu aŭ du paĝoj (aŭ eĉ pli multaj), devas esti fragmento de la Evangelio kaj iu prediko, almenaŭ malgranda..

Jan Książek. Pollando

● Jam de 1974 mi abonas «*Biblia Revuo*»-n, kaj mi restis fidela al ĝi ankaŭ post la morto de nia kara pastro Paruzel. Delonge mi nun rimarkas, ke en EK ne plu aperas anoncoj pri ĝi. Mia demando, ĉu eble ĝi ne plu estas rekomendinda revuo?

Josef Cremer, F. R. Germanio

La neaperigo de anoncoj pri «*Biblia Revuo*» en EK ŝuldiĝas simple al manko de spaco. «*Biblia Revuo*», ja (kiu okupiĝas pri bibliaj kaj orientaj studoj), estas daŭre rekomendinda. Informoj kaj specimenoj estas riceveblaj ĉe: *Biblia Revuo, Piazza Duomo 4, I-48100 Ravenna, Italio*.

Antonio De Salvo

● Mariusz Soja, ul. Ożynowa 29, PL-53.009 Wrocław, Pollando, 22-jara studento, deziras korespondi kun italaj geesperantistoj, pri vivmanieroj, religioj, naciaj aferoj, ktp.

NI GRATULAS

● La Germana Asocio por Helpi la Leprulojn (*Deutsches Aussätzigen-Hilfswerk e.V.*, Postfach 348, D-8700 Würzburg 11, F. R. Germanio) eldonis Esperantlingvan faldfolion, kiu prezentas la problemon de lepro en la nuntempa mondo kaj la agadon por ĝin solvi.

Kiel konate, tre aktiva en la iniciatoj favore al la Lepruloj estas d-ro Josef Kondor, estrarano de IKUE kaj landa reprezentanto por FRG (v. EK 9/79, p. 159).

● Laŭ iniciato de la Esperanto-Grupo de Verbania (Italio), gvidata de s-ro Leone Costantini, la Loka Turisma Entrepreno aldonis esperantlingvan folion al turisma prospekto titoliĝanta « *De l' verdaĵo al la lago: Verbania* ».

Adreso: Azienda Autonoma Soggiorno, corso Zanitello 8, I-28048 Verbania Pallanza/Novara, Italio.

● Sac. D-ro Anselm Schwab, Superulo de la konata Maria Pilgrimejo Maria Plain (Salzburg, Aŭstrio), esperantisto de pli ol 50 jaroj, iĝis 70-jara 3.6.1980.

● Laŭ iniciato de Mark B. Weddell, landa reprezentanto de IKUE por Usono, fondiĝis « Sud-Orienta Esperanto-Centro » (*Southeastern Esperanto Center*, Box 1042, Indian Rocks Beach, FL 33535, Usono), kun la celo informi pri Esperanto en la sudorienta parto de tiu granda lando. Ankaŭ grava estos la eldona agado de la Centro; ĝi koncernos ne nur verkojn de usonaj aŭtoroj kaj tradukantoj, sed ankaŭ verkojn en difinitaj kampoj, kie ekzistas kelkaj « truoj » en la esperantista mondo.

Nun planata estas anglalingva eldono de « Esperanto sen antaŭjuĝoj » de Walter Francini, kaj nun verkata estas angla-esperanta Katolika Terminaro.

● Roland Jossinet (Parizo/Francio) kaj Heinrich Post (Menden/F. R. Germanio) aktivas por Esperanto jam de 60 jaroj.

● Sep seminarianoj, el kiuj unu fariĝos sacerdoto dum la kuranta jaro, sukcese finis la Esperanto-kurson prizorgitan de Prof. Josip Velebit ĉe la Teologia Fakultato de Zagrebo/Jugoslavo (v. EK 5/1980, p. 75).

● Prof Franjo Gruič, landa reprezentanto de IKUE por Jugoslavio, gvidis elementan kurson de Esperanto por tri siaj kolegoj, profesoroj en la porpastro Seminario de Djakovo.

● Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr João Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa 4, Portugalio, iĝis peranto de IKUE en Portugalio. La jara kotizo en tiu Lando estis fiksita je 600 eskudoj.

MAITRI-MOVADO POR INTERŜANĜO KUN LA LANDOJ DE LA TRIA MONDO

La movado *Maitri* fondiĝis en Pollando en 1976. Kion signifas partopreni en ĝi?

Unuflanke, ĝi estas movado de helpo al homoj senigitaj je elementaj vivrimedoj. Sendante pakon kun vestoj aŭ kun medikamentoj al iu el la landoj de la Tria Mondo, vi jam fariĝas partoprenanto de *Maitri*. Ĉi tiu maniero de partopreno estas la plej simpla kaj malfermita por ĉiu. Ĝi ne postulas organizadon, nek organizaĵon. Tia unufoja akto de helpo jam estas certa rezigno. Se vi ne kontentiĝos pri tio, sed strebos al limigo de la propraj materiaj bezonoj, vi per tio plifirmigos vian partoprenon en la movado.

Aliflanke, la movado *Maitri* konsistas en transformo de sia konscio. Se vi scipovas rekoni la homecon de tiuj, al kiuj vi helpas, se vi scipovas apreci la valoron de iliaj kulturoj kaj religioj, se vi penas neniiigi superstiĉojn kaj falsajn imagojn pri la mondo de tiuj homoj, tiam vi fariĝas pli konscia partoprenanto de *Maitri*. Partopreno en ĉi tiu aspekto de la movado dependas de la nivelo de viaj kulturo, scio kaj religieco.

La pleneco de la partopreno en la movado *Maitri* manifestiĝas en la scipovo de samtempa prenado kaj donado. Ĉerpante el la spirita trezorejo de la komunumo, al kiu vi helpas, vi profundigas vian propran kulturon, religiecon kaj vian personan ligan kun Dio. La situacio de reciproka interŝanĝo permesas al vi konservi la homan dignon — estos al vi fremda la opinio pri supereco, samkiel la negado al la mondo, en kiu vi elkreskis.

La movado *Maitri* fontas el la instruoj de Kristo. Ĝi estas nenio alia ol plenumado de la ordono pri amo. Homaj modeloj de tia amo en la kristanismo estas por ni sanktaj Cirilo kaj Metodio, s-ta Francisko el Asizo, Patro de Nobili, Albert Schweitzer, pastoro Martin Luther King; sur la hindia grundo, Ramakrishna, Vinoba Bhave kaj Mahatma Gandhi, kiu la unua formulis la principion de interŝanĝo, dirante pri sia lando: « Hindio bezonas helpon, sed kiom ĝi povas doni! ». La termino « *maitri* », ĉerpita el la sanskrito, indikas specialan orientiĝon de nia amo: temas pri amo inter homoj de diversaj religioj kaj rasoj. En la movado *Maitri* povas partopreni ĉiu, senkonsidere pri sia riĉeco, edukiteco kaj kredo.

La senpera inspiro al la movado estas la agado de la kongregacio fondita de Patrino Tereza el Kalkuto. Tial la plimulton da niaj sendaĵoj ni direktas al la adreso de ĉi tiu kongregacio.

La ĉi-subaj du citaĵoj proksimigas al ni la signifon de la vorto « *maitri* »:

« La ĉefa el... la virtoj, la amo (en la sanskrito "*maitri*"), estas iom malpli nuancita per sento ol la analoga virto kristana. Ĉi tiu termino devenas el la vorto "*mitra*" ("amiko"), kaj oni povas ĝin traduki: "amika sinteno", "bona volo", "bondeziremo", tamen en la sanktaj libroj de la budaismo ni trovas fragmentojn, kiuj priskribas "*maitri*" kun pasio simila al la fama himno de s-ta Paŭlo pri la virto de amo:

"Ĉiu vivanta estaĵo, malforta aŭ forta,... naskita aŭ ankoraŭ ne naskita, ĉiu vivanta estaĵo estu plena de ĝojo. ...Samkiel patrino, dum ŝi vivas, ŝi zorgas pri sia sola infano, tiel la homo portu ĉionampleksantan amon al ĉiuj vivaj estaĵoj. Li sentu senliman amon al la tuta mondo, amon etendiĝantan en ĉiujn direktojn, per nenio limigitan" ».

Artur L. Basham, « The Wonder That Was India »

« *Karuna*, t. e. kunsento kun la suferanta homaro, konvinkis Budaon rezigni pri la trono kaj serĉi vojon al liberiĝo, kaj post lia iluminiĝo, ĝi irigis lin al longa predikista migrado, dum kiu li transdonadis sian penson al ĉiuj homoj. "*Abinsa*", t. e. doktrino de neperfortado, ne estis por ili nur negativa koncepto. Ĝi ligiĝis kun "*maitri*", bondeziremo al ĉiuj homoj kaj amikeco kun la tuta kreitaĵaro. Kiel diras Dhammapada: "Malamo nenian neniigos malamon. Bonkoreco neniigas malamon. Tia estas la eterna leĝo" ».

John B. Chethimattan, « Patterns of Indian Thought »

Maitri, estas, antaŭ ĉio, fundamenta principio de kontakto de homo kun homo.

Ĉefa adreso de la kongregacio: Mother Teresa, Missionaries of Charity, 54 A. Lower Circular Road, Calcutta 16, Hindio. Adresoj de la movado en Pollando: 1) Siostry Szarytki - Maitri, Warszawa, ul. Tamka 35 - 2) Parafia przy Bazylice Mariackiej-Maitri, ul. Podkramarska 5 - 3) Parafia Najświętszego Serca Jezusowego - Maitri, PL-41092 Bytom, ul. Pułaskiego 9.

● Fondiĝis en Antverpeno, *Belgio*, Komitato por la efektivigo de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto (1982). El la 6 membroj, 4 estas IKUE-anoj: Edward Symoens, Roger De Schepper, Jules Verstraeten kaj Wim De Smet.

Laŭ la regularo de UEA, la organiza komitato de U.K. devas starigi garantian kapitalon, kiu estas uzata en kazo de defcito. Tio okazas per subskribo, flanke de la landaj esperantistoj, de promesoj de po 25 guldenoj. La antverpena Komitato (ASPC 67ste Wereldcongres Esperanto, Arse-naalstraat 5, B-2000 Antwerpen, Belgio) alvokas tiucele la belgan esperantistaron.

ELEKTU VI MEM VIAN KATEGORION !

Verŝajne vi konsentas, ke la esperantistoj konsistas el multaj kategorioj, malgraŭ tio, ke oni ofte nomas ilin « samideanoj ». Ni volas priparoli tiujn kategoriojn, kvankam ne eblas garantii, ke ni nomas ĉiujn.

1. *Bonan-tagon-esperantistoj*

Ilia vortprovizo estas tro limigita. Kelkajn esprimojn ili bonege scias, ekz. « bonan tagon », « kiel vi fartas? », « ĝis revido ». Cetere ili ĉiam parolas nacilingve. Tre ofte ili portas grandan verdan stelon.

2. *Eternaj komencantaj esperantistoj*

Dum pli ol jardekoj ili jam studas la Internacian Lingvon, sed ili mal-multe progresis. Kiam aliaj esperantistoj alparolas ilin, ili ruĝiĝas kaj ne scias respondi. Generale ili tre flue parolas nacian lingvon en esperantokunvenoj.

3. *Filatelist-esperantistoj*

Ili volonte korespondas kun ĉiuj landoj, sed nur por interŝanĝi poŝtmarkojn. Cetere ili ne partoprenas esperantistan vivon.

4. *Vortar-esperantistoj*

aŭ promenantaj vortaroj, kontraŭe, scias multege da esperantaj vortoj, precipe tiujn, kiujn oni preskaŭ neniam bezonas. Sed en interparolo kun aliaj ili mallerte balbutas; ili neniam legas libron (krom vortaron), kaj korespondi ili ne ŝatas.

5. *Gazet-esperantistoj*

opinias, ke ĉiu, kiu pli malpli bone scipovas Esperanton, havas taskon verki gazet-artikolojn. Tiu kategorio senesperigas verajn redaktorojn. Iliaj plumfruktoj ne bongustas. Verkado postulas apartan talenton.

6. *Klub-esperantistoj*

loĝas precipe en grandaj urboj, kie la verda movado floras. Ili regule vizitas la kunvenojn en propra klubo, sed tute ne interesiĝas pri la distrikta, pri la landa aŭ internacia movado, pri kongreso k.t.p.

7. *Kongres-esperantistoj*

plejparte estas fraŭloj (ambaŭseksaj), loĝante izolite en malgrandaj lokoj. Ili havas amikojn en ĉiuj urboj, kie jam okazis internaciaj kongresoj. Sed en la propra loko, urbeto aŭ vilaĝo ili estas (kaj daŭre restos) la solaj esperantistoj.

8. *Gramatik-esperantistoj*

favore studas la teorion flankon de nia lingvo. Pri la plej subtilaj gramatikaj demandoj ili scias la sole ĝustan respondon. Ve, kiu uzas la lingvon ne laŭ iliaj konsiloj. Ĉiam ili havas ruĝan krajonon en la mano.

9. *Nur-esperantistoj*

estas homoj, por kiuj la zamenhofa kreaĵo estas la sole ĝusta vivocele. Ili interesiĝas pri nenio alia. Neniām ili legas nacilingvan libron aŭ ĵurnalon. Ilia domo estas plena de esperantaĵoj. Ili portas verdan stelon, verdstelajn ringojn, manikbutonojn, poŝtranĉilojn, kraĵonon; eĉ nokto-vestoj estas ornamitaj kvinpintstele. En ĉiu rondo ili parolas daŭre pri Esperanto, ĉiun ili salutas esperantlingve. Ili estas la plej bonaj kontraŭ-propagandistoj de nia movado.

10. *Politik-esperantistoj*

politikas sian ekstreman radikalan politikan opinionon, prefere en la verda movado; verŝajne tial, ĉar ekster tiu movado neniu aŭskultas ilin. Ili estas eksterordinare aktivaj. En ĉiu kunveno aŭ kongreso ili petas plurfoje la parolon, disdonas flugfoliojn, kolportas memverkitajn gazetojn k.t.p. Esperanto estas por ili politika ĉastereno.

11. *Opozici-esperantistoj*

Ili ŝatas aŭdi sin mem, sed oni malmulte povas diri, se oni samopiniias kun la gvidantoj. Tial ili ĉiam estas kontraŭ la agoj de la plimulto. Ili amas fortajn, akrajn kvalifikaĵojn kaj senfinajn lamentadojn. Se oni volas kredi al ili, ĉiuj aktivuloj en niaj organizoj estas trompantoj aŭ profitemuloj aŭ diktatoroj.

12. *Kritikemaj esperantistoj*

Tiu kategorio daŭre observas, klasifikas kaj severe prijuĝas la samideanojn. Neniu taŭgas krom ili mem. La saĝa leganto aŭ askultanto verŝajne jam konstatis, ke la verkinto de ĉi tiuj linioj estas unu el la plej tipaj reprezentantoj de ĉilasta kategorio. Probable ni forgesis kelkajn kategoriojn. Ĉu vi, leganto, jam renkontis vian portreton? Aŭ ĉu vi apartenas al la 13-a kategorio?

13. *La ordinaraj esperantistoj*

Ili estas progresemaĵoj homoj, kiuj interesiĝas pri multaj aferoj i.a. ankaŭ pri Esperanto. Ili uzas la lingvon praktike kaj klopodas disvastigi ĝin. Por ili Esperanto estas bona rimedo por atingi altan, tuthomaran kulturon.

KOTIZOJ 1981

Sekve de la ĵusa, rimarkinda devalutiĝo de la jugoslava dinaro, *certe* kreskos la jugoslava kotizo por 1981.

Eble kreskos ankaŭ la kotizo por aliaj landoj, kiuj spertis lastatempe faktan devalutiĝon.

Tamen, pagante por 1981 ĝis la fino de la kuranta jaro, oni povos ĝui, ĉiukaze, la nunan (pli favoran) tarifon.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tiuj estu en ordo la ŝspedo de la revuo). La jara kotizo de membro-abonanto estas 20 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, precipe de svisa franko, la sube indikitaj egalvaloroj havas nur informan celon.

Argentino

P. Bruno Ostropolski
Av. Libertad, 75
RA - 3360 Obera, Misiones

Aŭstralio

C.A. Sullivan
56 Royal Terrace
Hamilton
Queensland 4007

Aŭstrio

W. Mudrak
Beatrixgasse, 19/9
A - 1030 Wien III - p.k. 105.713
ŝil. 160

Belgio

E. Paesmans
Lange Koepoortstr. 64
B - 2000 Antwerpen
p.k. 000-0414589-11; b. fr. 350

Brazilo

P. Petro Urbaitis
caixa postal 4421
BR - 01000 S. Paulo, S. P.

Britio

J. Harris
26, Dare Road
Birmingham B23 6PD
br. p. 6

Ĉeĥoslovakio

Aleš Berka
Na Vyhliedec 1002, p.s. 28
CS - 755.01 Vsetin

Francio

P. R. Degrelle
11, cours Léopold
F - 54042 Nancy Cedex
p.k. 2555 38 L, Nancy
fr. fr. 52

F. R. Germanio

J. Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D - 545 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726 - 673, Ludwigshafen
Rhein; gm 24

Hindio

P. O. M. Lucas, ofm Cap.
Shanti Ashram, Gandhipuram
Coimbatore 641012

Hispanio

Miguel Martinez
Av. da San José 105, pral 3a
Zaragoza - pes. 850

Hungario

P. Lajos Kóbor
Fö u. 58
H-9365 Dénesfa

Irlando

P. J. O'Reilly
« Monksilver », Howth Summit
Co. Dublin

Islando

Torfi Ólafsson
Melhaga, 4 - 121 Reykjavik

Italio

P. Duilio Magnani
Viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini (Forlì)
p.k. 28/19956 (UECI) -
lir. 10.000

Japanio

Hatirō Matubara
Namimatu-tyō 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu

Jugoslavio

P. Prof. Franjo Gruič
Strossmayerov trg, 5
YU-54400 Djakovo
din. 200

Kanado

Sino P. Proulx
790, 80-ème rue Est
Charlesbourg 7 Québec
G1H 1A9

Kolombio

Jorge Velásquez G.
Apartado aéreo 51740
Medellín

Suda Koreo

P. Kiseng Kim
I.P.O. Box 2752 - Seoul

Madagaskaro

Roger Randrianekena
BP 14
Ambatondrazaka

Meksikio

P. J. M. Clarament
Apartado postal 318
Oaxaca, Oax

Nederlando

S. P. Smits
Dunantstraat, 164
NL 2713 VC Zoetermeer
p.k. 685124 - gld 25

Norvegio

S. Murak
Semsvn 166, N - 1370 Asker

Nov-Zelando

G.D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando

P. J. Gotter
Trzebnice 113
PL-59.312 Chocianowicz

Portugaliao

Port. Esp. Asocio
Rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
600 esk.

Svislando

P. Scherer - Graber
Erlen-Str. 58
CH - 6020 Emmenbrücke/Lu
sv. fr. 20

Schweiz. Kath. Esperanto-Verein,
Luzerner Kantonalbank
en Emmenbrücke
poŝtĉeka konto 60-3852
Luzern

Tajlando

P. M. Perray
GPO Box 1846 - Bangkok

Tajvano/Formozo (Ĉinio)

P. J. B. Se Cien Kao
P.O. Box 1269
Taipei 100, Taiwan R.O.C.

Urugvajo

R. Zeballos Morales
Av. Centenario 3099, C., Ap. 805
Montevideo

Usono

Mark B. Weddell
P.O.B. 1042
Indian Rocks Beach
Florida 33535
us. dol. 13

